Norvega Esperantista Ligo

# Jarraporto 2024

Aprobota dum la landa kunveno 2025

## Ekstera informado

Ni havas retpaĝaron www.esperanto.no, kiun prizorgas Jardar Eggesbø Abrahamsen kaj Judith Parelie Abrahamsen. Ĝi enhavas ampleksajn informojn pri Esperanto norveglingve, sed ne estas ofte ĝisdatigita. NEL ankaŭ havas konton en Facebook, kie aperis kelkaj mesaĝoj, ĉefe ligitaj al kursoj.

## Instruado

NEL aranĝis printempe retan kurson per Zoom, entute ok kursvesperoj. Estis kvar partoprenantoj. Tra la jaro kunvenis preskaŭ ĉiusemajne grupo da kvin progresantoj. Instruis Marianne Lund.

## Kontakto kun la kluboj kaj la membroj

Ne okazis landa kunveno en 2024.

La 19-an de julio, NEL-estraranoj organizis kunvenon por kursanoj kaj junaj membroj en Oslo.

Eldoniĝis kvar numeroj de Norvega Esperantisto. Redaktis Claude Rouget. La redaktoro provis variigi la enhavon kaj ricevis pozitivajn reagojn de la legantoj.

La norveglingva retpoŝta informilo Esperanto-nytt eldoniĝis ok-foje dum la jaro. Estis enkondukita nova fasono kaj dissenda sistemo. La informilon ricevas membroj kaj aliaj interesatoj. Redaktis Bård Hekland.

Informoj dissendiĝis ankaŭ per la retpoŝta listo NEL-inform, kiun administras Jardar E. Abrahamsen. La estraraj protokoloj estis afiŝitaj en niaj retpaĝoj.

Laŭstatutajn jarraportojn sendis la kluboj de Tromsø, Oslo kaj Trondheim.

## Administrado

La oficejo Esperantonia en Oslo estis ĉefe uzata kiel stokejo. Tra la jaro, estraranoj plurfoje organizis purigadon kaj ordigadon. En aŭgusto, reprezentantoj de Esperanto-Centro Herzberg vizitis kaj forprenis diversajn duoblaĵojn kaj revuojn por sia arĥivo. En oktobro, Claude Rouget pasigis semajnon en la oficejo, i.a. por serĉi informojn por Norvega Esperantisto kaj organizi ordigadon de kolektoj dum *Operasjon Dagsverk*, kie partoprenis ses junaj ne-membroj. La ejo estis dufoje luigata, kion prizorgis la Oslo-klubo.

La estraranoj troviĝas tra la tuta lando, kaj preskaŭ la tuta komunikado inter ili okazas rete. Okazis 9 retaj estraraj interkonsiliĝoj.

En 2024, NEL havis 3 aktivajn aliĝintajn klubojn: Oslo (30 membroj), Tromsø (8 membroj) kaj Trondheim (10 membroj). Estas ankaŭ ioma aktivado en Rogaland kaj la reta kunvenrondo gvidata de Marianne Lund. La suma membronombro estis 93. El tiuj, 10 estis sub 35-jaraĝaj kaj 25 dumvivaj membroj.

Ne estis aktivado kadre de Norvega Junularo Esperantista.

Unuafoje en moderna historio de NEL la ordinaraj elspezoj (98 000 NOK) estis duoble pli altaj ol la ordinaraj enspezoj (45 200 NOK). Tio ŝuldiĝas plej unue la nun altaj preskostoj de la revuo plenkolora

kun kvar numeroj 28-paĝaj jare. Norvega Esperantisto kostis ĉ. 13 000 kronojn jare en 2022 kaj 2023, sed la kosto kreskis al 30 400 kronoj en 2024. La kolektitaj kotizoj (24 600 kronoj) unuafoje ne kovras la kostojn de la membrogazeto. Tamen post la registrado de la financaj enspezoj (profito de niaj akcioj en Skagenfondene), la malprofito ne plu estas 53 000 kronoj, sed nur 16 500 kronoj. La kostoj de la revuo nun estos stabilaj, sed estas maltrankvile ke la kotizoj de jaro al jaro malkreskas, ĉar malnovaj membroj malaperas kaj venas tro malmulte da novuloj.

Legaco Rolf Uhlen disdonis unu subvencion en 2024. Je la fino de la jaro, ĝia kapitalo estis 1 059 464 kronoj. La legacan estraron konsistigis Herman Ranes (prezidanto), Judith P. Abrahamsen (kasisto), Ulf Lunde (estrarano), Bård Hekland kaj Leif Arne Storset (anstataŭantoj).

La estraron de NEL konsistigis Bård Hekland (prezidanto), Jardar E. Abrahamsen (vicprezidanto), Marianne Lund (sekretario), Claude Rouget (kasisto) kaj Lars Sandbakk (estrarano). Alexander H. Kvidbergskår estis elektita anstataŭanto en 2023, sed ne partoprenis en la estrara laboro.

## Resumo

En 2024, nia multjara kunordiganto kaj oficeja deĵoranto Douglas Draper devis forlasi siajn asociajn taskojn. Ne eblas supertaksi kiom kontribuis Douglas al la funkciado de NEL tra la lastaj pli ol kvardek jaroj. La estraro volas esprimi siajn profundajn dankon kaj estimon.

Tra la jaro, la estraro prioritatis kvar taskojn. 1) Eldoni malpli multajn, sed pli variajn Norvega Esperantisto, kun koloroj. La plano estis tri numeroj, sed pro la pozitivaj reagoj kaj diversaj kontribuoj, fine iĝis kvar. La presado kaj distribuado de papera gazeto multe kostas, sed restas prioritata. 2) Proponi retan suplemento per rete dissendita norveglingva informilo *Esperanto-nytt*. Per ĝi eblas doni pli oftajn ĝisdatigojn pri Esperanto-rilataj okazaĵoj en- (kaj ĉefe) eksterlande. 3) Daŭre oferti kurson por norveglingvaj komencantoj kaj progresantoj per Zoom. 4) Ordigi Esperantonian por ke ĝi estu pli facile utiligebla.

Pri tiuj kvar taskoj ni sukcesis. Ne mankas aliaj farindaĵoj, sed surbaze de la haveblaj organizaj fortoj, la estraro kontentas pri tiuj modestaj atingoj. Sen alfluo de novaj fortoj necesos prioritati kaj efike utiligi niajn rimedojn por daŭre provizi bazajn informajn kaj membrajn servojn en la venontaj jaroj.

La 1-an de majo 2025

La liga estraro

Bård Hekland, Jardar Eggesbø Abrahamsen

Marianne Lund, Claude Rouget, Lars Sandbakk